

SVENSKA  
ESPERANTO-  
TIDNINGEN

# La Espero

2013 : 4

## Rejkjaviko – kongresurbo 1977 kaj nun 2013



Hallgrímskirkja

**N**i kiuj venis por kongresi 2013, povis facile konstati jam duonvoje, post 25 km, ke la urbo konsiderinde kreskis. La plej frapa impresio estis, ke staris grandaj arboj kaj arbustoj proksime al la novaj kaj modernaj domoj.

Ju pli proksime ni venis al la urba centro, des pli da verdaj parkoj kaj ĝardenoj. Kia metamorfozo! Troviĝas multaj novaj konstruaĵoj en la urbo, eĉ altaj kaj relative grandaj. Verŝajne dezajnitaj de modernaj arkitektoj.

“Harpa”, granda nigra domo por la islanda simfoniorkestro kaj por operoprezentoj, ekfunkciis antaŭ du jaroj. Ĝi estas tre oportuna por diversspecaj kongresoj kaj bone funkciis por la mil kongresantaj esperantistoj ĉi-jare.

Kongresa inaŭguro en bela teatra salono, kun la islanda prezidento. Dimanĉe je la deka horo komenciĝis la inaŭguro de la 98-a Universala kongreso. Surpodie sidis Probal Dasgupta kun siaj estraraj kolegoj. Probal fariĝis prezidanto 2007. Tio signifas ke li ne rajtas kandidati por prezidanteco trian fojon, sinsekve, ĉar la statuto ne permesas pli ol du periodojn en vico.

La Ĝenerala direktoro de UEA, Osmo Buller, tradicie sidas apud la prezidento. Ankaŭ aliaj personoj sidas ĉe la tablo, personoj kiuj prelegos aŭ informos pri

gravaj programblokoj. Sur rezervitaj seĝoj sidis reprezentantoj por eksterlandaj ambasadoj. Kelkaj el ili estis ĝuste la ambasadoroj. Inter la ambasadoroj sidis iu ambasadoro. Li estis kongresano, ĉar li estas unu el ses nomumitaj Honoraj Patronoj de UEA. Lia nomo, Ulrich Brandenburg, kiu estis gvidanto inter la germana junulara movado en juna aĝo. Nun li estas ambasadoro por Germanio en Moskvo.

Daŭrigo sur paĝo 3



La islanda prezidento Ólafur Ragnar Grímsson bonvenigas la kongresanojn.

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

2013 • 101-a jarkolekto

Fondita en 1913

**Redaktion:** Bengt Olof Åradsson och Olof Pettersson

**Frågor om prenumeración, adressändringar o. dyl.:**

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24, 113 42

Stockholm, tel. 08-34 08 00. sveda@esperanto.se

**E-post:** laespero@esperanto.se

**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm

**Utformning:** Omnibus Typografi & Bengt O Åradsson

**Tryck:** Pingvinpress, Råå

**Prenumeración 2013:** 200 kr.

Prenumerationsavgiften för La Espero ingår i medlemsavgiften.

Plusgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET

**Adress:** Esperanto-Centro, tel. 08-34 08 00

Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,

**E-post:** sveda@esperanto.se

**Nätsida:** www.esperanto.se

**Öppettider:** Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

**Plusgiro:** 20 12-3, Esperantoförbundet

**Medlemsavgift 2013:**

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar

under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU,

Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.

Tilläggssexemplar kostar 100 kr/år).

**UEA-avgifter och prenumerationer:** Leif Holmlund,

Kågevägen 40 B, 931 38 Skellefteå, tel: 0910-733810

## ESPERANTOFÖRLAGET

**Adress:** Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,

**Postgiro:** 578-5

**Nätsida:** www.algonet.se/~eldona

**E-post:** eldona@telia.com **Telefon:** 070-5850054

## ESPERANTOGÅRDEN

**Adress:** Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,

**Nätsida:** http://www.esperantogarden.se

**E-post:** egarden@esperanto.se

**Telefon:** 0590-309 09

## Manus till La Espero

sänds till Bengt Olof Åradsson

Nygatan 10A, 281 48 Hässleholm; tel 070-200 4574

**e-post:** laespero@esperanto.se

	Stopdatum	Utkommer senast
Nr 1	15 januari	15 februari
Nr 2	28 februari	30 mars
Nr 3	30 april	31 maj
Nr 4	15 augusti	15 september
Nr 5-6	31 oktober	30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

## La SEF-estraro ekde la kongreso en majo 2013 konsistas el:

**Prezidanto:** Ann-Louise Åkerlund, Helsingborg. Eklernis esperanton en 1996, prezidanto de Klubo Esperantista de Helsingborgo ekde 1999, direkciaro de Sveda Esperanto-Instituto (SEI) ekde 2005, estrarano/sekretario de SEF ekde 2007.

**Vicprezidanto:** Olof Pettersson, Skarpnäck. Eklernis Esperanton kaj membriĝis en la Esperanto-Klubo de Stokholmo en 1999, estrarano de SEF ekde 2008, vicprezidanto ekde 2010.

**Sekretario:** Puff Östling, Örebro. Eklernis Esperanton en 1980. Iama sveda redaktoro de Kvinpinto. membro de la LKK por la IJK en Karlskoga 1991. Membris en la estraro de Esperantogården. Estrarano de SEF ekde 2013.

**Estrarano:** Stella Lindblom, Lysvik. Naskiĝis en la movadon. Filino de Anita Dagmarsdotter kaj Roland Lindblom. Estis estrarano de SEJU, La Ranetoj kaj la Stokholma klubo. Ĉefredaktis Kvinpinton, la kuna membrogazeto de la Nordiaj junularaj asocioj. Aranĝis renkontiĝojn, KEFojn kaj duone IJKn. Ĉef-administranto de EsperantoSverige.se. Nova estrarano de SEF ekde 2013 kun respondecas pri interretaj demandoj.

**Estrarano:** Dan Palm, Helsingborg. Eklernis esperanton kaj membriĝis en Klubo Esperantista de Helsingborgo en 1996. Anstataŭanto ekde 2009 kaj estrarano de SEF ekde 2010 kun respondecas pri la membreregistro.

**Anstataŭantoj:** Roland Lindblom, Haninge/Brandbergen. Eklernis esperanton 16-jara. Kunfondis SEJU-n en 1958 kaj klubojn en Alingsås, Trollhättan, Nynäshamn kaj Haninge. Estrarano kaj vicedestrarano de SEF ekde 1974, prezidanto dum tri periodoj: 1978-85, 1991-2000 kaj 2011-2013. Prezidanto de la LKK por la Universalaj Kongresoj en Stokholmo 1980 kaj en Gotenburgo 2003. Estrarano de UEA 1983-1986. Honora membro de UEA ekde 2013.

**Anstataŭantoj:** Bengt-Olof Åradsson, Hässleholm. Eklernis esperanton en 1971. Estrarano kaj vicedestrarano de SEF ekde 2005, prezidanto 2005 – 2011. Redaktoro de La Espero ekde 2012. Redaktas ekde 2005 la gazeton Dia Regno, organo de KELI (Kristana Esperantista Ligo Internacia).



Daŭrigo de paĝo 1

La islanda prezidento iras al la mikrofono kaj bonvenigas la kongresanojn, en la islanda lingvo. La prezidanto ankaŭ estas La Alta Protektanto por la kongreso: Ólafur Ragnar Grímsson.

En la kongresa libro troviĝas rubriko Honora Komitato. Tie troviĝas la nomo de eksa prezidanto, nome Vigdis Finnbogadóttir. Ankaŭ la nuna ĉef-ministro aperis sub tiu rubriko.

### La Monda Foiro

Ĝi okazis sabate vespere. Tiam la landaj asocioj kaj fakaj organizoj havas okazon montri siajn agadkampojn kaj reklamilojn sur dis-

donitaj tabloj de sama malgrandeco. Por la SEF-tablo respondis Jill Hilford kun helpantoj. Svarmoj de kongresanoj cirkulis ĉirkaŭ la tabloj.

**Nova estraro elektita**  
Jam sabate kunsidis la

Komitato, por aŭskulti kion la kandidatoj por estraraj postenoj volis esprimi pri siaj interesoj labori en la UEA-estraro. Nova sperto por la SEF-estrarano Olof Pettersson, kiu anstataŭas A-L Åkerlund en ĉi-tiu kongreso.

Por nova tri-jara periodo estis elektitaj sep estraranoj:

- Mark Fettes. Prezidanto. Nova en la estraro. El Kanado. Tre sperta en la movado.
- Stefan MacGill. Vic-prezidanto. Verŝajne la plej renoma el la estraranoj. Li laboris en la

Roter dama stabo, estis prezidanto de ILEI. Verkis amuzajn lernolibrojn. Loĝas en Hungario.

- Martin Schäffer. Nova. Ĝenerala sekretario. Germano kiu loĝas en Meksiko.
- Jung-Kee Lee (Koree: I ĝung gi). Instruas esperanton en Universitatoj. Establis Kulturcentron.
- Barbara Pietrzak. Reelektita. Estis ĝenerala sekretario dum du periodoj. Pollando. Laboris per la esperantaj radioelsendoj de Pola Radio.
- Stefano Keller. Reelektita. El Svislando.
- José Antonio Vergara. Estrarano de UEA 2007 ĝis 2010. El Ĉilio. Sperta esperantisto.

Observu! La antaŭa estraro konsistis de kvar virinoj kaj tri viroj. Nun nur unu virino...

### Koncerto kun Ĵomart kaj Nataŝa



Denove sukceso! Ili aperis en pluraj kongresoj kaj fariĝas pli kaj pli profesiaj. La esperanta publiko amas ilin. Ĉi-foje Ĵomart surprizis la publikon. Li faris tute belan gitarkomponaĵon de la Esperanto himno. Ĝin sekvis longa kaj forta aplaŭdo.



### EsperantoSverige.se en la kongresa programo.

Stefano Keller, la estrarano de UEA estis gasto en la SEF-kongreso en Karlstad. Li aŭskultis tri prelegojn de Stella Lindblom pri nova modelo por Esperanto en tuta Svedio. Li tre interesiĝis kaj proponis al la programfaristoj por la islanda kongreso, ke Stella devas prelegi. Aperis ankaŭ artikolo en la kongresa libro pri la temo kaj pri Stella. Stella estis aktiva antaŭ pluraj jaroj kaj bone konas la novan prezidanton Mark Fettes, kaj ili diskutis pri la nova modelo. Ankaŭ H. Tonkin parolis kun ŝi kaj subtenas ŝian laboron.

### Aŭkcio de donacitaj raraĵoj – kutima programero.

La unua aŭkcio en la longa ĉeno de aŭkcioj, okazis en la UK 1980 en Stokholmo. La ideo pri tia programero naskiĝis en la stokholma LKK. Tomas Jansson estis la unua aŭkciisto. Montriĝis ke la kongresanoj ŝatis tian ŝancon akiri ion raran en konkurenco kun aliaj.

La nova estraro de UEA 1980, ankaŭ trovis ke tia programero devus aperi denove. Tiam Humphrey Tonkin eniris en la rolon kiel aŭkciisto – kaj fiksiĝis en tiu rolo. Humphrey verŝajne estis kreita por tiu rolo, kaj li rapide fariĝis la estradulo kiu povis regi la publikon per magio aŭ per drastaj argumentoj.

⇒



Jill kaj Anna dum la movada foiro

La nova estraro de UEA





Stella prelegas pri EsperantoSverige.se

En Rejkjavik li surmetis larĝ-vizieran ĉapon kiel amuzan atributon. Li estas la ununura por tia rolo. Gratulon al Humphrey kaj gratulon al la kongresa publiko.

**Akademio de Esperanto**  
Laŭ tradicio akademianoj suriras podion por respondi demandojn pri vortoj kaj gramatikajn problemojn.

Unu el la demandoj temis pri elekto inter EBLO kaj EBL-EC-O. Kelkaj respondis ke la elekto

dependas de la nacilingva vorto. La sveda *-het* donas impreson ke ni devas skribi EBLECO. Finfine iu faris iun ekzemplon, kiu klare montris ke estas du diversaj vortoj kun diversaj signifoj.

Akademiano Brian Moon gvidis. Otto Prytz el Norvegio, ofte komentis, kelkfoje Christer Kiselman.

**Roland Lindblom**  
**Fotis Olof Pettersson**

## Nova honora membro de UEA: Roland Lindblom

**D**um la kongreso en Rejkjaviko, la Komitato de UEA decidis elekti Roland Lindblom novan honoran membron. Li estas bone konata en Svedio, li estis prezidanto de Sveda Esperanto-Federacio dum tri periodoj, tenas kontakton kun tiuj kiuj petas informojn pri esperanto, aranĝis multfoje budon ĉe la sveda *Skolforum*, konstante aktivas en loka agado, kaj okupiĝas pri vortaro. Krom li, ankaŭ Biruta Rozenfelde el Latvio elektiĝis honora membro, kaj ŝi estas bone konata al svedoj kiuj partoprenas

aranĝojn de Baltaj tagoj. Tria honora membro estis Hallgrimur Saemundsson, kiu bedaŭrinde forpasis kelkajn semanojn antaŭ la formala elekto, kaj li ankaŭ estis konata al svedoj ekde la kongreso en Rejkjaviko en 1977.

Per tiuj elektoj, UEA nun havas 47 honorajn membrojn, inter kiuj troviĝas unu plia svedo, Ebbe Vilborg.

Universala Esperanto-Asocio fondiĝis en 1908, kaj havas membrojn en pli ol cent landoj.



Roland Lindblom parolas kun Barbara Pietrzak. Fotis Olof Pettersson

Ulla Luin

## Interreto speguliĝis en prelegoj

**I**nterreto estas pli kaj pli grava por la esperanto-movado. En la 1990-aj jaroj, esperantistoj estis inter la pioniroj kiam temis pri interreta uzo. Nun la tradicia labormaniero de vesperaj kursoj, leterkursoj kaj klubaj kunvenoj ne estas plu la sola labormaniero en socia vivo.

**ESF**  
En la kongreso en Rejkjaviko, la gvidanto de la usona fonduso *Esperantic Studies Foundation* (ESF) Mark Fettes prezentis la subtenon de la fonduso al aro da projektoj, kiuj iel rilatas al la lingva situacio en la mondo aŭ rekte rilatas al esperanto. La fonduso nun donas subvenciojn al ellaboro de nova versio de *lernu.net*, al simpozio "Nitobe", al partopreno el foraj landoj en kursoj de "NASK" en Usono, al interreta Youtube-kanalo, kaj eventuale al esplorprojektoj pri

interreta indekso pri lingva justeco aŭ interreta paĝaro pri lingvo-esploroj. Karakterizo de la subvencioj estas ke la estraro de ESF ne nur donas monon sed ankaŭ kompetente atentis pri la organizo de la laboro al kiu ĝi donas monon.

### lernu.net

En prelego de la "kleriga lundo" en la kongreso en Rejkjaviko, Peter Balaž el Slovakio prezentis grandan aron da interretaj paĝaroj, kiujn la organizaĵo "e@i" prizorgas aŭ planas. Inter tiuj projektoj, *lernu.net* estas la plej konata, kaj ĝi poste ricevis propran prezenton pere de Erinja Piataska el Usono. Tiu paĝaro ekhavas novan bazan rakonton por la kurso, kaj tial necesas trovi tradukantojn por ĉiuj el la lingvoj en kiuj ĝi aperas. Tio speciale gravas por svedaj esperantistoj, ĉar *lernu.net* estas pli kaj pli

grava, kiam tradiciaj kursoj kaj leterkursoj ne plu estas same uzataj.

**Kaj en multaj aliaj kunsidoj**  
Krome menciindas, ke la sveda paĝaro *esperantosverige.se* estis prezentita en aparta prelego. Alia interreta laboro temas pri arkivoj kaj bibliotekoj, kaj ĝin prezentis Detlev Blanke, la gvidanto de "CED" (Centro de Esploro kaj Dokumentado), kune kun Roland Rotsaert. TEJO parte iras kontraŭan vojon, kaj denove publikigos sian "pasportan servon" en papera formo. UEA havas en sia planado ke necesas rekonstrui partojn de ĝia interreta paĝaro.

Certe en plej multaj el la fakaj kunsidoj oni parolis pri interreta evoluo, sed ne eblis ĉion partopreni.

Ulla Luin



... och program 11–13 oktober 2013

## Kallelse till Esperanto-Gårdens årsstämma ...

**D**u som är medlem i Esperanto-Gården ekonomisk förening, välkommen på vår årsstämma lördagen den 12 oktober 2013 kl. 13 på plats i Lesjöfors. Och är du inte medlem än, så är det enkelt att ordna saken på plats. En andel kostar 100 kronor.

Styrelsen

**F**rån fredag till söndag (rekommenderad avresedag) blir det program, delvis öppet för allmänheten, i samband med Esperanto-Gårdens årsstämma.

Vår gäst **Josep Franquesa Solé** från Katalonien berättar om hur handel på esperanto har lönat sig och vad man ska tänka på för att lyckas inom internationell handel. Fredagens föreläsning tolkas till svenska.

Dessutom kombinerar vi mötet med en träff för aktiva inom [esperantosverige.se](http://esperantosverige.se).

Vi kommer att uppdatera på [www.esperantogarden.se](http://www.esperantogarden.se) -> Aktiviteter.

**Anmälningar och frågor till:**  
(vi vill känna till behovet av övernattningsplatser och mat)

[egarden@esperanto.se](mailto:egarden@esperanto.se),  
tel. 0590 309 09

## El antaŭaj numeroj

### La Espero oficiala organo por kaj svedaj kaj norvegaj esperantistoj

**E**n la januara numero 1915 de La Espero ni povas legi:

Norvega Esperantisto ĉesas ĝis plue kiel memstara organo, aliĝante al "La Espero" kiel subfako por la norvega propagando. Niaj du nacilingvaj alvokoj al la abonantoj (N. E. 1914, n-oj 4 kaj 5-6) sufiĉe komprenebligas tion kaj al la kelkaj respondintoj kiuj promesis subtenon kaj esprimis konsenton, kaj al la plimulta nerespondintaro kies silentan konsenton ni supozas.

La afablan proponon de Gävle Esperantoförening ni danke akceptis, unue pro la ekonomia stato kiu ĉiuokaze estus necesigonta ian ŝanĝon, due por kunhelpi laŭ povo al la en multaj rilatoj dezirinda skandinava kunlaborado, kaj fine tial ke ni bone memoras la en multaj gazetoj dum pacaj tempoj ripetitan plendon ke estas tro multe da gazetoj.

Ni bedaŭras ke por la nuna provjaro ne aliĝis ankaŭ la danoj.

H. Bonnevie

H. Bonnevie, Kristiania, ekde la decembra numero 1915 fariĝis kunredaktoro de La Espero kune kun unue J. Lundgren, Hedemora, kaj J. Helsing, Gävle, kaj poste kun Paul Nylén (junio 1918 – decembro 1920). Ekde januaro 1922 La Espero denove estas organo nur por SEF

## La unua redaktoro

### Esperantister:



Rudolf Pehrsson,

vars drag vi härovan ha nöjet presentera, avgår fr. o. m. detta nummer som La Esperos redaktör. Detta på grund av värnplikten, som i november detta, år kallar honom.

Pehrsson har alltsedan sitt inträde i esperantorörelsen år 1910, varit en av rörelsens bästa och mest uppskattade krafter. Han har under en följd av år varit Gävle Esperantoförenings pliktrogne sekreterare och en medlem, som aldrig fattats på mötena.

Som redaktör för La Espero, vilken befattning han innehaft



sedan årsskiftet 1912-1913, har han nedlagt ett drygt och självuppoftande arbete för den svenska esperantorörelsen. Lugn och sansad som han är och omtyckt av oss alla, har han åtnjutit en hel del andra förtroende uppdrag; bl.a. var han Gävleföreningens ombud vid esperantodagarna i Norrköping, sekr. i S.E.F:s verkställande utskott, m. m.

Då Pehrsson nu reser till sin garnison för att där tillbringa ett år, så förstå alla att Gävle Esperantoförening för en tid kommer att sakna en av sina duktigaste och mest uppskattade medlemmar. Men hoppas vi att han även på den plats, där han nu kommer att vistas, skall vara till gagn för vår rörelse.

Bästa kamrat! Med dessa rader som ett uttalande av den tacksamhet, med vilken esperantisterna Sverige runt mottagit ditt arbete under de gångna åren, är det mig ett stort nöje att få önska dig en god fortsättning, med hopp om att även efter det du återkommit i det civila få konstatera din hjälp i arbetet för vårt kära språk.

Einar Adamson.

## Somera kurso en Gotenburgo

**D**um la semajno 8 – 12 julio 2013 (lunde ĝis vendrede) Sveda Esperanto-Instituto havis somerkurson pri Esperanto en Gotenburgo. La kurso aranĝiĝis kune kun la studorganizo Vuxenskolan en ties studejoj en la urboparto Vasastaden.

La 13 partoprenantoj dividigis sur tri nivelojn: I komenĉantoj, II daŭrigantoj, III konverciantoj. La kursoj okazis paralele per tri longetaj lecionoj potage: antaŭtagmeze, posttagmeze kaj vespere. La vesperaj lecionoj estis uzataj por komunaj aktivecoj. La du niveloj pli malaltaj lernadis per la lernolibro EPoGo. La plej alta nivelo eliris de gazetaj artikoloj, Interreto k.t.p.; interalie oni prilaboris kaj ĝisdatigis broŝuron pri la fama gotenburga parko *Trädgårdsföreningen*, kiun oni ankaŭ vizitis.

La jaŭdo post lunĉo estis dediĉita al duontaga ekskurso al Marstrand, kie oni ricevis gvidadon en la sveda kaj Esperanto, kaj kie tiuj, kiuj konatiĝis kun Andreo kaj Emma, la ĉefuloj de EPoGo, povis vidi reale ilian hejman vivmedion. La vetero estis bonega dum la tuta semajno. Samspeca vetero estas mendita por la venontjara kurso!

Ann-Louise Åkerlund  
Siv Burell fotis



## Sommarkurs i Göteborg

**V**eckan 8 – 12 juli 2013 (måndag till fredag) hade Svenska Esperanto-Institutet en sommarkurs i esperanto i Göteborg. Kursen var ett samarrangemang med Studieförbundet Vuxenskolan och hölls i studieförbundets lokaler i Vasastaden.

Det var 13 deltagare som var uppdelade på tre nivåer: I nybörjare, II fortsättare, och III konversation. Kurserna löpte parallellt med tre längre pass per dag: förmiddag, eftermiddag och kväll. Kvällspassen användes för gemensamma aktiviteter. De två lägre nivåerna använde läroboken EPoGo. Den högsta nivån utgick från tidningsartiklar, internet m.m.; bl.a. uppdaterade man en broschyr om den kända anläggningen Trädgårdsföreningen i Göteborg, där man även gjorde ett besök.

Torsdag efter lunch ägnades åt en halvdagsutflykt till Marstrand, där guidning på svenska och esperanto gavs, och där de som stiftat bekantskap med Andreo och Emma, huvudpersonerna i EPoGo, fick se deras hemmiljö i verkligheten. Vädret var strålande vackert hela veckan. Likadant väder är beställt till nästa års kurs!

Ann-Louise Åkerlund  
Foto Siv Burell

## Someraj vizitoj venis el Latvio, Francio, Hungario k.a.

La someraj kafejaj kunvenoj en Stockholm havis plurajn vizitojn dum majo ĝis aŭgusto 2013. Unua venis el Latvio, **Margarita Želve** el Riga. Ŝi estas prezidantino de Latvia Esperanto-Asocio, kaj dum kelkaj tagoj ŝi estis en Stockholm kaj Uppsala kadre de eŭropa "Erasmus" interŝanĝa programo, por profesie viziti medicinajn bibliotekojn. Ŝi partoprenis kafejan kunvenon en junio, kaj eblis renkonti ŝin ankaŭ en la kongreso en Rejkjaviko kelkajn semajnojn pli poste.

Fine de junio alvenis **Françoise Noireau**, violonistino el Francio, survoje al festivalo de tradiciaj/folkloraj muzikoj en Dalarna dank'al la invito de la violonisto

kaj esperantisto Martin Strid. Ŝi partoprenis kafejan kunvenon en Stockholm, ludante melodiojn el diversaj landoj, kaj survoje hejmen post la restado ŝi restis plian tagon en Stockholm.

Dum bela tago en aŭgusto, Gunvor Spector kaj Hans Dahl en Nynäshamn gastigis grupon da esperantistoj el Stockholm, kiuj tie ankaŭ renkontis hungarinon **Zsuzsanna Agnes Berényi**, emerita instruisto pri matematiko kaj fiziko. Siatempe ŝi verkis disertaciojn pri lingvistika matematiko kaj pri historio de framasonismo, kaj en Stockholm ŝi intencis viziti hungaran asociojn por prelegi pri framasonismo. Ŝi ankaŭ venis por partopreni konferencon pri kemio en Uppsala.

Alia pli ofta vizitantino estis **Raita Pyhälä** ("Saliko") el Finnlando, kiu jam pli frue gastis en vintra klubkunveno en Stockholm, preterpasante je pli longaj vojaĝoj.

Rapidan viziton al Svedio ankaŭ faris la ĉina **delegacio**, kiu kelkajn tagojn pli frue prezentis turisman ekspozicion pri Ĉinio dum la kongreso en Rejkjaviko. En Stockholm la delegacio prezentis alispican ekspozicion, pri desegnaĵoj laŭ tradicia ĉina maniero, kaj ankaŭ ekspozicion pri esperanto-libroj. La vizito en Stockholm daŭris nur unu tagon, sed la vizito en Svedio ankaŭ enhavis tagon en Esperanto-Gastejo en Lesjöfors.

Ulla Luin

## Simpozio “Nitobe” pri rolo de la angla lingvo

La usona fonduso *Esperantic Studies Foundation* (ESF) iniciatis sesion de simpozio pri la uzo de la angla en universitatoj en norda Eŭropo kaj ankaŭ en aliaj partoj de la mondo, en serio da simpozioj kun la nomo “Nitobe”. La simpozioj estis plurlingva, kaj okazis dum du tagoj antaŭ la esperantokongreso en Rejkjaviko.

La simpozio en Rejkjaviko havis elirpunkton je ellaborata libro pri ideologio kaj realo, kiam temas pri uzo de la angla lingvo en nordeŭropaj universitatoj. La libro aperos en 2014 en serio pri studoj pri la monda lingvo-problemo ĉe nederlanda eldonejo John Benjamins. Redaktoro pri tiu serio da libroj estas Humphrey Tonkin, kiu estas konata en la esperanto-mondo, kaj kiu estis pli frue prezidanto de ESF.

### Dudek kvin prezentoj

En la programo estis 25 mallongaj prezentoj, ĉefe angla-lingvaj sed okazis prezento ankaŭ en esperanto (kun skriba resumo sur la ekrano en la angla). La prezentoj temis pri situacio en pluraj mondopartoj: norda, meza kaj suda Amerikoj, landoj en norda Eŭropo, EU-landoj en aliaj partoj de Eŭropo, kaj kvin el la multaj landoj en Azio.

Du specoj da situacioj estis prilumataj, nome unuflanke ekonomio, aliflanke la diferenco inter ideologio kaj realo en diversaj manieroj.

### Ekonomio de universitatoj influas al lingvo-elekto

Universitatoj en multaj partoj de la mondo havas nuntempe la ekonomian situacion ke ili devas mem zorgi pri siaj enspezoj, kaj ne plu povas aŭ tute ne povas fidi je ŝtata mono por sia ekzisto. Se la propra “merkato” de studentoj ne estas sufiĉe granda, ili devas provi varbi studentojn el aliaj regionoj kaj aliaj landoj, kio siavice devigas la universitaton uzi plurajn lingvojn. Tamen, ne estas certigo ke tiu adaptiĝo al la merkato vere donos pli bonan ekonomion al la universitato, kaj eĉ povas okazi la malo.

### Lingvo – laŭ plano (ideologio) aŭ laŭ realo

Lingvo en universitato estas uzata en pluraj diversaj situacioj. Unu situacio temas pri la lingvo en kiu la profesoroj parolas dum siaj prelegoj kaj kursoj. Dua situacio estas la skribita lernomaterialo, kiu ne

ĉiam estas en sama lingvo kiel la instruado. Tria situacio estas la lingvo de la universitata administrado, formularoj, atestoj pri ekzamenoj, kontakto kun ofiĉistoj. Kvara situacio estas la realo: la kontaktoj inter la studentoj, kiuj ofte faras siajn proprajn decidojn kiujn lingvojn uzi, kiuj eble ne kongruas kun la deciditaj elektoj de lingvoj.

El pluraj el la prezentoj eblis konstati, ke en multaj partoj de la mondo la lingva situacio estas multe pli komplika ol en Svedio. Universitatoj en landoj kun multaj grandaj minoritatoj eble devas uzi du aŭ tri lingvojn jam sen provi vendi studlokojn al eksterlandanoj, kaj kelkfoje la najbaraj landoj havas pli prestiĝajn lingvojn aŭ pli da literaturo pri temoj kiuj gravas por la koncerna regiono da landoj, kaj tio ankaŭ forte influas al la elekto de lingvoj.

### Kaj poste


En la resuma kunsido, H. Tonkin demandis kiel oni pluen-iru post tiuj ĉi diskutoj, kaj ĉu troviĝas ideoj pri studoj aŭ esploroj, kiujn ESF povus partopreni. M. Fettes ankaŭ menciis, ke ESF publikigis eblecon peti stipendion por esploro pri temo kiu estas en la linio de la celo de la fonduso.

Tio ĉi estis la 6a simpozio en la serio kun nomo *Nitobe Symposium*. La nomo Nitobe por la serio de la simpozioj estas elektita laŭ la nomo de japana diplomato, kiu laboris en la 1920-aj jaroj ĉe organizaĵo kiu poste fariĝis UNESKO, kaj kiu tie levis la demandon de komuna lingvo. La simpozio en Rejkjaviko okazis kun subteno de pluraj islandaj universitataj institucioj, inter alie *Árni Magnússon Institute for Icelandic Studies*, kaj krome kun subteno de ESF kaj la nederlanda eldonejo. La pli fruaj simpozioj okazis en kunligo kun esperantokongresoj en Tokio (2007), Vilnius (2005), Pekino (2004), Berlino (1999), Prago (1996).

Ulla Luin  
Fotis Olof Pettersson



H. Tonkin



K. Tylgat



C. Kiselman



O. Pettersson



J. Lindstedt

## Karin Lindquist

**K**arin Lindquist (1930–2013) estis prezidanto de Sveda Esperanto-Federacio (SEF) 1985–1991, la unua virino en tiu rolo. Ŝi forpasis en majo 2013.

Karin naskiĝis en Tryde apud Tomelilla en suda Svedio, lernis esperanton frue, kaj aktivis kune kun la unua edzo Sven Strandberg en la esperanto-klubo de Lund. Ekde 1964 ŝi estis turisma fakdelegito de UEA, kio kongruis kun ŝia profesia laboro en la urba turisma oficejo. La najbara klubo de Malmö ankaŭ profitis de ŝia aktiveco, kaj ŝi estis ĝia prezidanto 1968–1969.

En 1983 ŝi edziniĝis kun Bernt Lindquist, kaj ili ekloĝis en Arboga, pli proksime de

Stockholm. Paralele al profesia laboro en la lokaj biblioteko kaj muzeo, kaj parte samtempe kun sia prezidanteco de SEF, ŝi ankaŭ estis redaktoro de *La Espero* dum pluraj jaroj, kaj komitatano A de UEA 1986–1992.

Ŝi emeritiĝis en 1997, kaj tiam Bernt kaj ŝi ekloĝis en Malmö, kie ŝi eniris la redakcion de “Ponto”, komuna organo por kelkaj orient-danaj kaj sud-svedaj esperantokluboj.

Multaj esperantistoj en kaj ekster Svedio memoros ŝin kiel sociema kaj energia persono, kun gastemo, kompetento kaj bona humoro.

Ulla Luin



## Carl Pettersson 1925–2013



**L**a 26-an de julio forpasis Carl Pettersson, inter la esperantistoj en Norrköping plej konata sub la kromnomo “Knall”. Li estis por la sveda movado tre grava, sed iom anonima, samideano kiu gvidis propran reklamfirmaon kaj ĉiam pretis profesie helpi al la loka esperantoklubo kaj SEF.

Inter liaj plej gravaj kontribuoj estis la laboro por la Universala Kongreso en Stockholm 1980 kaj pretigado de SEF-budoj en diversaj aranĝoj kiel Skolforum. Al ni en Norrköping li ĉiam malavare donis konsilojn rilate al reklamado, kaj estis li kiu propramane belege

ornamis la ejon de la Sveda Esperantokongreso en Norrköping 1989. Dum tiu kongreso li ankaŭ pretigis la scenejon antaŭ teatra prezentado de Jadwiga Gibczyńska pri la virinoj ĉirkaŭ Zamenhof. Lia verva laboro dum akrobata grimpado sur la muroj multe impresis la aktorinon, kaj kiam ŝi komprenis ke li parolas Esperanton ŝi ekkriis: “Ĉu tiu mirinda viro estas esperantisto?” Jes, li vere estis, kaj li vere estis mirinda!

Haldo Vedin